

Theodor Storm,
Profundaj ombroj, 3

tradukita de Manfred Retzlaff

Post la morto de lia unua edzino Konstanco ekkaptis la poeton teruro antaŭ „tiu eterna dezerta estonteco“, vidalvide de ammalplena, senfeliĉa ekzistado, pri kiu neniu kredo je rekuniĝo en la transo povas konsoli. Lapide kaj dure, ne uzante la de li alitempe preferatan kantformon, la poeto parolas pri tiu nova sperto:

Samkiel jena fatamorgano de la dezerto
Petolas antaŭ mi
La penso pri senmorteco;
Kaj en la pala nebulo de l' malproksimo
Ĝi trompe montras al mi vian bildon.

Ege doloriga spiro de sopiro,
Sveniga espero min kaptas;
Sed mi levas min pene;
Al vi, al vi;
Ĉiu tago estas paŝo al vi.

Sed, rigora lumo eniĝas;
Kaj antaŭ mi ĝi etendiĝas,
Dezerte, plena da teruro kaj soleco;
Tie, fore, mi antaŭsentas la abismon;
En ĝi la nenio. –

Sed pluen kaj pluen
Trenas mi min
De tago al tag',
De monat' al monat',
De jaro al jar';

...

Ĝis mi finfine
Elĉerpita je l' vivo kaj sen espero
Falos suben ĉevoje
Kaj la malnova eterna nokto
kovros min komplete,
Kune kun ĉiuj revoj kaj sopiroj.

*Traduko de la Germana poemo "Tiefe Schatten, 3" de THEODOR STORM (Teodoro Stormo, *1817-09-14 - †1888-07-04) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (*1938-11-04) en 2002-04-14.*

MR-385-1 / Arg-790-1583 (2013-01-22 16:33:44)

Esperantigis: Manfredo Ratislavo (Manfred Retzlaff) en 2002-04-13/14 laŭ la origina, germanalingva teksto, kiu aperis en la libro „Theodor Storm“ de Regina Fasold, el la serio Bild-Biographie, eldonita de la eldonejo VEB Bibliographisches Institut Leipzig, en 1990, ISBN 3-323-00196-6. El tiu libro estas pre-nita ankaŭ la supra klariga teksto.